
KATALIN SMIDÉLIUSZ

INTERLINGVISTIKO VIVPROKSIME

LINGVOPLANIGO KIEL PEDAGOGIA RIMEDO -
RAPORTO PRI UNIVERSITATA EKSPERIMENTO

Zusammenfassung
Interlinguistik hautnah

(Sprachplanung als sprachdidaktisches Mittel - Bericht über ein Experiment an der Universität Szombathely)

Der Artikel berichtet über ein Experiment, in dessen Verlauf Philologie-Studenten an der Fakultät für angewandte Sprachwissenschaft in Szombathely (Ungarn) im Rahmen eines Seminars die Aufgabe bekamen, in kleinen Gruppen Sprachprojekte auszuarbeiten. Die Autorin analysiert die Erfahrungen, die bei dieser sehr aktivitätsfördernden und lehrreichen Übung gemacht wurden. Das Experiment hat bei den Studenten großen Anklang gefunden und viele linguistische und sprachdidaktische Erkenntnisse gebracht. Neben den im Artikel aufgelisteten und noch weiter zu untersuchenden Beobachtungen bringt die Autorin Beispiele für Pronominal-, Nominal-, Verbal- und Zahlensysteme aus den neun Sprachprojekten, die von den 33 Studenten ausgearbeitet wurden.

Abstract
Hands-On Interlinguistics

(Language Planning as a Teaching Technique - A Report on an Experiment at Szombathely University)

The article describes a unique experiment in which university-level students studying philology in the Department of Applied Linguistics in Szombathely, Hungary, working in small groups, had to create linguistic projects for a seminar in linguistics. The author analyzes what happened in that active and instructive exercise, which was viewed as very successful by the 33 students involved and which produced many useful linguistic and pedagogical conclusions. Among the observations presented and those awaiting further analysis are noteworthy examples of the pronoun, noun, verb, and number systems of the nine projects.

1 LA PROGRAMO DE LA STUDOBJEKTO INTERLINGVISTIKO

Kadre de la universitatranga fako aplikata lingvistiko, kiu estis lanĉita en Szombathely (Hungario), en la studjaro 1998/99, la studobjekto interlingvistiko ricevis lokon en la programo. Ekde tiu jaro ĝi estas instruata dum la du unuaj semestroj de la 5-jara trejnado.

La celoj dum tiu seminario estas: studi lingvopolitikajn demandojn, ekzameni apriorajn kaj aposteriorajn filozofiajn lingvoprojektojn, ekkoni la plej gravajn artefaritajn lingvojn. Kvankam la fakoj de la plejmulto de la studentoj estas la angla aŭ la germana lingvo, estis ĝenerale rimarkebla fakto, ke komence ili posedis tre malmultajn ĝeneral-lingvistikajn

konojn. Ili kapablis havi superrigardon nek pri sia gepatra lingvo, nek pri la konataj fremdaj lingvoj, ne povis doni pri ili strukturajn analizojn. Ilia lingvokono konsistis nur el la traduko de konkretaj strukturoj kaj esprimoj.

La temo de la nova studobjekto postulis, ke la studentoj travidu la strukturojn de la lingvoprojektoj, kapablu eltiri proprajn konkludojn, en ili kreiĝu konkretaj pretendoj dum la analizo de la unuopaj lingvoj.

2 LA METODIKAJ PAŜOJ DE LA LINGVOPLANIGO

Komence de tiu seminario ni parolis pri la sekvaj temoj: lingva komunikado, lingvopolitikaj demandoj, lingvoprojektoj ĝenerale, la perfekta lingvo de Dante, aprioraj lingvoj de Lullus, Francis Bacon, Descartes, Dalgarno kaj John Wilkins. Por faciligi la studojn, tro teoriajn por unuakursano, ni alproksimiĝis al la temo de la praktika flanko. Kadre de tiu laboro la agadon de la malgrandaj grupoj ni efektivigis en tri ŝtupoj:

Por la unua provo la studentoj, sen iu ajn antaŭprepariĝo, dum seminaria horo devis skizi la bazon de propra, surloke inventita lingvoprojekto.

La projekto prezentiĝis destinita iĝi la nova, komuna lingvo de la Eŭropa Unio. La lingvo devis esti: *simpła*, *regula*, *facile lernebla kaj la leksiko devis baziĝi sur la eŭropaj lingvoj*.

En la dua etapo la grupoj povis labori pri la projekto dum du monatoj, por ellabori la detalan gramatikon de la lingvoprojekto kaj krei ties bazan vortprovizon kaj modelfrazojn.

La tria fazo estis kiam la grupoj devis prezenti sian lingvoprojekton al la aliaj, argumentis pri la logikeco de siaj solvoj, respondis al la starigitaj demandoj.

Ĉiuj tri fazoj havis siajn lingvistikajn kaj pedagogiajn taskojn (kaj ankaŭ spertojn).

3 LA EKSPERIMENTO

3.1 LA UNUA ETAPO

Dum la du ĝisnunaj studjaroj entute 33 studentoj partoprenis en la laboro, formante laŭplaĉajn grupetojn. Ĝenerale 3 personoj estis en unu grupo, sed pro "lingvistikaj" malkonkordoj estis unu persono kiu tute sole laboris (la kreinto de la lingvo MINE), dum kelkaj pigraj studentoj kaŝis sin en pli grandaj grupoj.

La skizoj, faritaj dum la **unua 90-minuta grupa laboro** estis mizeraj. La plej ĝenerala sperto estis, ke la studentoj tute ne sciis kiel priskribi lingvon. (Ili produktis el vortkategoria vidpunkto miksitajn vortlistojn, ofte grupigante la vortojn en konversaciajn temojn. Troviĝis grupo, kiu opiniis la plej grava tasko listigi la fleksiaĵojn kaj finaĵojn.)

Por plupaŝi necesis doni al la studentoj ampleksajn klarigojn pri la bazaj nocioj, manieroj priskribi lingvojn, ktp.

3.2 LINGVISTIKAJ KAJ PEDAGOGIAJ TASKOJ DE LA DUA ETAPO

En tiu periodo dum la seminarioj ni okupiĝis ne pri la planado de propra lingvo, sed analizis diversajn filizofiajn lingvoprojektojn, tamen ĉiam troviĝis iom da tempo, se liveriĝis demando pri la kreenda propra projekto.

Por ke la studentoj povu progresi en la laboro

- necesis konigi al ili aron da lingvistikaj terminoj
- studigi al ili lernolibrojn pri lingvoj kaj gramatikoj
- helpi apliki analizon, sintezon (studo de la lingvoj, rimarko de ĝeneralaj reguloj)
- evoluigi la lingvistikan fantazion (trovo de novaj leksemoj)
- alkitimigi ilin al logika, kreiva pensado (konstruo de la propra sistemo)
- instigi la gestudentojn labori grupe
- kaj igi ilin kompili enhance kaj estetike altnivelan laboraĵon pere de komputilo

La finverkitaj projektoj unue estis trastuditaj de mi mem, kaj laŭbaze de miaj analizoj mi difinis la vicordon de la antaŭpublikaj prezentadoj kiuj okazis en formo de seminaria prelego farita de la grupo, kies membroj dividis inter si la taskojn.

3.3 DUM LA PREZENTADO DE LA PROPRAJ PROJEKTOJ OBSERVEBLIS LA SUBAJ RIMARKOJ:

a) la prezentantaj studentoj

- montris siajn kapablojn prelegi, prezenti sciencajn temojn antaŭ publiko
(komence balbuta prezentado, ligita al la paperoj)
- la inventitan projekton devis koni tiomgrade, ke ili povu respondi al la demandoj, kapablu argumenti pri la temo
(ili ne ĉiam travidis la propran projekton, "kaptiĝis" je la demandoj de la publiko)
- fariĝis fieraj pro la identiĝo kun la propra lingvoprojekto
(ili esprimis siajn emociojn tre kuraĝe, nature; aludis al sia projekto ne per ties nomo, sed per la esprimo "NIA LINGVO")

b) la aŭskultantaj studentoj

- aŭdante, ene de malmulte da tempo devis trividi la fremdajn strukturojn

(komence la studentoj apenaŭ povis sekvi la prezentadojn poste pli kaj pli ili al kutimiĝis)

- devis rimarki en la lingvoj la (ne maloftajn) kontraŭdirojn kaj mallogikaĵojn (*kaj fariston kun ĝuo por embarasigi la alian grupon*)
- prijuĝis la aŭditajn projektojn, esprimis sian opinion pri tiuj (*plej ofte en tre edukita, inteligenta maniero*).

4 KIAJN PLUAJN EBLOJN POVAS DONI LA DETALA ANALIZO KAJ KOMPARO DE LA LINGVOPROJEKTOJ?

La analizo de la kreitaj lingvoplanoj donas atentendajn informojn ĉefe por la instruanto, sed estis interese, ke ankaŭ la studentoj scivolis pri la rezultoj. Ĉiu el la sube listigitaj punktoj meritis apartan analizon, profundan studon, sed pro spacaj kialoj nur resume mi povas aludi al la observitaj kaj ankaŭ dum la sekvaj jaroj observendaj fenomenoj.

4.1 OBSERVAĴOJ RILATAJ AL LA STUDENTAJ LINGVOPROJEKTOJ

- elekto de la nomo de la lingvoprojekto: la nomoj kiel *UNI DUMI*¹, *EULES*², *UNIWERSALO*, *SIMPLE* memorigis pri la Eŭropa Unio kaj pri la fiksita kriterio, ke la lingvo estu simpla; *HAVAJONHO* estas la kunmetita formo de la unuaj kvar personaj pronomoj de la lingvo; *DALINGVA* aludas al la fakto, ke en la lingvo estas aplikata plurfoje duobligo, do ĝi similas al kvazaŭ balbutado³; *MINE* pensigas pri "minestrone", itala legomsupo; por la nomo de la lingvoj *MAJO* kaj *TINK* ne troveblis klarigo.
- fonemsistemo: ĉiu grupo uzis 5 vokalojn - *a, e, i, o, u* - ; unu donis eĉ fonetikan transskribon,
- grafikaj sistemoj: *TINK* uzis ne nur la kutimajn latinajn literojn (ĉ [t_]),
- apliko de diversaj signoj por esprimi la emociajn tonojn de la frazo⁴ (Uniwersalo):
 - :-) por esprimi ĝojon (ĉe la entajpado de tiuj klavoj en la komputilo aperas la sekva figuro ("smile") _ ;
 - :-(por esprimi tristecon _ ;
 - :-s tristeco kaj ĝojo miksite
 - :-o miro
 - :-| indiferenta mieno,
- tipologia klasifiko de la lingvoprojektoj: en pluraj kazoj estis donita sed plej ofte ne la ĝusta,
- vortkategorioj: en neniu projekto tiuj estis prilaboritaj detale, nek finpensitaj logike; la plej bona estis la sistemo de la pronomoj (vd. Tabelo 1.),

- kiagrade ili strebis al la reguleco, senescepteco (substantivoj, vd. Tabelo 2.),
- kie rimarkeblis la plej grandaj mankoj: verbosistemo: ekz. estas prilaborita nur indikativo, mankas pluraj verbotempoj kaj modoj, (vd. Tabelo 3.),
- nur du projektoj (*SIMPLE* kaj *MINE*) okupiĝis pri la ellaboro de participaj formoj
- en 4 lingvoprojektoj troveblas helpverboj,
- la sistemo de la numeraloj , malgraŭ mia atendo, estas nek internacia, nek facile ellegnebla (vd. Tabelo 4.),
- el la 9 lingvoprojektoj 7 kreis prepoziciojn,⁵
- kreado de la vorttrezoro : preskaŭ duonon de la leksiko donas memkreitaj, abstraktaj vortoj, nur 30-35 % estas radikoj, pruntitaj el aliaj eŭropaj lingvoj. (Eĉ ne unu lingvo estis pure tia aŭ alia.) Malpli ol 10 procentojn kovras tiuj vortoj kiuj montras klaran rilaton al la hungara lingvo, gepatra por la studentoj. Pro ties petoleco, spriteco eble estus interese montri el ili kelkajn ekzemplojn.

hungardevenaj vortoj:

- transprenitaj kun eta modifo, kun aldono de ferma morfemo:

boltu (_ bolt) = butiko, ebu (_ eb) = hundo

- sen formoŝanĝo, kun la uzo de popolaj, dialektaj aŭ slangaj vortoj:

ibrik (_ ibrik) = taso,

pipi (_ pipi, infana vorto) = kokino,

gebe (gebe= ĉevalaĉo) = ĉevalo,

guvad (_ guvad = gvatas, forte rigardas) = vidi,

dundi (_ dundi = diketa, infana vortuzo) = dika,

ludeme kreitaj vortoj, kies signifo iumaniere aludas al la nomenda koncepto

durac (_ Duracell, marko de baterio) = baterio,

sihu (_ sihuu, infana onomatopeo por lokomotivo) = trajno

rigo (_ rigó = turdo) = mateno

yoyo (_ yoyo = nomo de ludilo) = ludilo

mizo (_ Mizo = marko de lakto) = lakto

vili (_ Vili = propra nomo de fabela pasero) = pasero

doromb (_ dorombol = ronronas) = kato

papaja (_ Papaya = nomo de fi-fama diskoteko en la urbo) = amuziĝi

- vortoj kreitaj el sinonimoj

kike (_ kikelet = poezia vorto por printempo) = *printempo*

dumi (_ dumál = multe, tede paroladas) = *parolas*

pocu (_ pocak = dika ventro, familia vortuzo) = *ventro*

telev (_ televizió) *televidilo*

Vortoj, prenitaj el fremdaj lingvoj:

- tuj, klare rekoneblaj

kanis = hundo, aplo = pomo, girlo = knabino, grina = verda, veko = semajno

- amuza vortmiksiĝo

busehofi = bushaltejo

- miskomprenablaj vortoj, falsaj amikoj

patri = somero, pome = iras, mano = laboro,
maiz= havas, vento = fenestro, animo = kuraĝo

Miksiĝo de hungaraj kaj fremdaj radikoj:

Sihuhofi = stacidomo

- vortfarado, derivado sprita, sed ne ĉiam tutlogika (UNI DUMI: numeraloj: *ei, ze, de, ...*; **tago**: *ge, lundo eige (unu-tago), mardo: zege...., monato: ufge, januaro ufge ei, (monato unu) februaro ufge ze*),
- la karakterizaj trajtoj de la donita vortaro: laŭtema, hazarda, por servi la traduktekstojn (ofte la vortoj ne estis laŭalfabete listigitaj, kaj ĉiam nur unudirekta listo "fremdlingva"-hungara),
- la tipoj kaj la celoj de la ekzemplofrazoj, ekzemplotekstoj (ili servas por gramatikaj, lingvistikaj celoj, estas kompilaĵoj: biografioj, fabeloj, letero, komerca anoncteksto),
- ĉu estis farita traduko de literaturaĵo (UNI DUMI: Petőfi: *La amo*; MINE: Kölcsey *Paraineise*, UNIWERSALO: *Nia patro - preĝo*),
- faritaj eraroj ("*en nia lingvo troviĝas la sekvaj prepozicioj: -dan = ĝis, -deg = jer, -fu = en, ktp. Tiuj staras ĉiam post la vorto.*"; "*nia lingvo estas freksia (sic!)*"),
- kiujn efikojn havas la lingvoj (*laŭfaka, studata/lernata lingvoj* de la studento, aŭ la gepatra lingvo). Pozitiva efiko: estas rekoneblaj la elementoj; negativa: evititaj solvoj)
- sintaksaj priskriboj apenaŭ troveblis en la projektoj

4.2 KOMPARO DE LA DIVERSAJ LINGVOPROJEKTOJ

- analizo de la similaj solvoj (lingvaj, leksikaj)
- preparo de frekvencolisto laŭbaze de la donitaj vortaroj

a) estis preskaŭ ĉiam ellaboritaj la nomoj de la monatoj, tagoj kaj koloroj

b) kelkaj el la vortoj kies ekvivalentoj troviĝas en ĉiuj lingvojprojektoj:

domo, patro, patrino, krajono, libro, lingvo, iras, studas, dormas, manĝas, skribas, granda, malgranda, bela, bona, kato, hundo

c) interesaĵoj, kelkaj el la - nur en unu lingvo troviĝantaj - vortoj:⁶

gladas, vulpo, aviadilo, genia, epigramo, karnavalo, klarvida, sperto, okupo, dediĉas, ŝultrosako, bovina sonorilo, fastado.

- provo krei kune pli perfektan lingvon uzante la plej bonajn elementojn de la prezentitaj projektoj

5 PRAKTIKA PROVO DE LA LINGVOPROJEKTOJ

La vera provo de la prezentitaj projektoj povas efektiviĝi, kiam ĉiu grupo kapablas traduki al sia lingvo la saman tekston, lingvajn formojn kun sisteme listigitaj ekzemplofrazoj. Dum la tradukado la studentoj povas rimarki la mankojn de sia lingvoprojekto, la neuzeblecon de la malbone aŭ nekomplete prilaboritaj strukturoj. Tiam la studentoj havas eblon pluperfektigi sian projekton, aldoni la mankantajn elementojn.

Dum la posta analizo la tradukoj de la sama teksto donas pli bonan eblon por la komparo kaj analizo de la projektoj.

6 KONKLUDO

6.1 ĜENERALAJ SPERTOJ

Planigo de lingvo kiel tasko estis nekutima al la studentoj, sed ili komencis la laboron kun granda entuziasmo. (Estas alia problemo, ke unu el la grupoj ne klopodis prepari sistemon plejeble taŭgan, ne povis/volis persiste labori). Dum la procezo mi sukcesis alkitimigi la studentojn al konscia kaj regula ekzameno de lingvaj sistemoj, al ampleksa struktura analizo de la gepatra lingvo, malkovro de lingvaj universalaj kaj instigi ilin al ties kreiva apliko.

Mia celo ne estis instigi ilin al kreado de nova lingvo, mi ne intencis superflue kreskigi la nombron de la ekzistantaj lingvoprojektoj kaj furoraj amatoraĵoj, sed se kelkaj el la grupo tamen havis tian utopian ideon, forlasis ĝin dum la dua parto de la semestro kiam ni analizis la kutime alte taksatajn lingvo(projekto)jn (*Volapuko, Esperanto, Ido, Occidental, Interlingua*, hungara *Romanid*) kaj novajn provaĵojn kiel inter aliaj: *Uropi, Lojban, Klingon, Europanto*. Tiun analizon la studentoj faris jam laŭ siaj spertoj, komparante, rigardante per aglaj okuloj la diversajn sistemojn, serĉante la formojn kaj solvojn, konvenajn al siaj pretendoj.

Fine de ambaŭ studjaroj en la taksado de la faritaj laboroj kaj taskoj la lingvokrea ekzerco kaj ties spertoj ricevis la plej pozitivan prijuĝon de la studentoj kaj fariĝis diskuttemo ankaŭ ekster la klasĉambroj. (Sekve por la sekvajara semestro aliĝis jam al la interlingvistikaj seminarioj kelkaj ankaŭ el miaj kolegoj). La akiritajn spertojn la studentoj povos bone utiligi dum siaj filologiaj studoj kaj lingvoinstrua praktiko. Studento jene resumis la esencon: " Se mi eklernos novan lingvon, mi komencos ne per la lernolibro, irante de unu leciono al la alia,

sed mi unue trastudos la gramatikan libron. Kial ne tiel oni instruis nin ĝis antaŭe?" Fakte kial ne?

6.2 KIEL TIU EKSPERIMENTO UTILIS AL ESPERANTO?

Krom la menciitaj utilaj lingvistikaj spertoj la studentoj vole-nevole havis daŭran kontakton kun planlingvoj, alkiutimiĝis al la ideo ke tiuj ekzistas, pluraj el inter ili funkciis kaj eĉ nun funkcias.

Fine de la dua semestro dum la ekzameno ili devas profunde koni unu el la pritrakitaj lingvoprojektoj. Literaturo por la prepariĝo mi mem disponigas aŭ direktas ilin al la reto. Nur unu lingvo estas kiun mi pretas instrui post la devigaj lekcionoj, tiu lingvo estas Esperanto.

Dum la unua jaro la fakultativan Esperanto-kurson vizitis pli ol la duono de la grupo kaj multaj sincere ekinteresiĝis pri la lingvo kaj ties movado.

La funkciadon de E-o la studentoj mem povis sperti, kiam dum unutaga ekskurso ni vizitis en Vieno la Internacian Esperanto-Muzeon kaj tie la direktoro de la muzeo s-ro Herbert Mayer en Esperanto prelegis pri la planlingvoj Occidental kaj Interlingua. Tiam evidentiĝis ke nia internacia lingvo taŭgas ankaŭ por fakaj, sciencaj celoj, tio ŝajnis esti grava argumento por E-o.

Eble el la trideko da filologoj nia movado gajnos "nur" kvar-kvin esperantistojn, sed certe ankaŭ en la aliaj restos pozitivaj opinioj pri la planlingvoj, kiujn ili povos transdoni dum la postaj lingvistikaj agadoj.

KLARIGOJ POR TABELO 1

Dum la ellaboro de la pronomoj la grupoj strebis al la senesceptaj solvoj, t.e. la kazojn, krom la nominativa (se entute ellaboritaj) ili solvis per la uzo de prepozicioj (SIMPLE, DALINGVA) aŭ per kaz-finaĵoj. En la lingvoj UNI DUMI, HAVAJONHO estas sufiksoj, en la lingvo MAJO la formado de la kazoj estas diversmaniera: en dativo ekzistas prefiksoj, en la aliaj kazoj ili uzas sufiksojn. Estas interese, ke en la lingvo DALINGVA en pluralo observeblas duobligo de la singularaj formoj. En la lingvoj MINE kaj UNIWERSALO por la pronomoj oni uzis la saman vokalon. Nur en la lingvo SIMPLE estas ellaborita ĝentila formo. Persona, nedifinita pronomo (en Esperanto "oni") kreiĝis nur en UNIWERSALO.

Mallongigoj:

p. – persono

G. - genitivo

N. - nominativo

Ins. - instrumentalo

A. - akuzativo

P. - prepozitivo

D. - dativo

TABELO 1: PRONOMOJ

Pronomoj						
	Mine N.	Uniwersalo N.	Eules N.	Havajonho N. A.	Majo N. A. P. D.	Simple N. A. P. D.
Sing. 1-a p.	me	bu	ma	ha hai	ego egom egoz cuego	ego ta ego lu ego ka ego
Sing. 2-a p.	te	cu	de	va vai	due duem duez cudue	tu ta tu lu tu ka tu
Sing. 3-a p.	se	du	si	jon joni	da dam daz cuda	ato ta ato lu ato ka ato
Oni		fu				
Plur. 1-a p.	ke	gu	mak	ho hoi	vini vinim vimiz cuvini	vi ta vi lu vi ka vi
Plur. 2-a p.	le	ku	dek	vat vati	bila bilam bilaz cubila	tem ta tem lu tem ka tem
Plur. 3-a p.	ve	lu	sik	jont jonti	toro torom toroz cutoro	sei ta sei lu sei ka sei
Pronomoj						
	Tink N. A./D. P.	Uni Dumi N. A. P.	Dalingva N. A. G. D. Ins.			
Sing. 1-a p.	ot ota otu	ba bam bas	ob li ob le ob la ob lu ob			
Sing. 2-a p.	to toa tou	ce cem ces	rok li rok le rok la rok lu rok			
Sing. 3-a p.	fer fera feru	do dom dos	tam li tam le tam la tam lu tam			
	fem fema fesu					
	fes fesa fesu					
Plur. 1-a p.	oto otoa otou	fo fom fos	obob li obob le obob la obob lu obob			
Plur. 2-a p.	mot mota motu	go gom gos	rokrok li rokrok le rokrok la rokrok lu rokrok			
Plur. 3-a p.	lat lata latu	ho hom hos	tamtam li tamtam le tamtam la tamtam lu tamtam			

TABELO 2: SUBSTANTIVOJ

	Havajonho	Majo	Simple	Tink	Uni Dum
Finajoj	neregula ibrik=taso skribo=krajono kanis= hundo	ĉiam -o melkefamo= penso zamero= domo	ĉiam -e kafe= kafo morne=mateno bire= biero	neregula imbra=pano lebem=akvo leke=fajro pibo=domo	vokalo sasu=bopatrino kike=printempo patri=somero
Pluralo	-l (-e kunliga vokalo)	-ta	-s	-z	-r
Markita akuzativo		-m (finaĵo)			
	Dalingva	Mine	Uniwersalo	Eules	
Finajoj	ĉiam -o femo=virino faziro=domo	neregula pal= domo geniz=trezoro	ĉiam -o domo=domo matro=patrino aplo=pomo	konsonanto liben=libro lakon=domo monid= knabino	
Pluralo	duobligo de la vorto	<u>-o</u>	-s	`k (-e kunliga vokalo)	
Markita akuzativo			-n (finaĵo)		

En neni lingvo estas kreita genro ĉe la substantivoj. Nur en du projektoj aperas markita akuzativo, kvankam ĝi forte enestas en la hungara lingvo. La aliaj lingvoj decidis pri la strikta vortordo.

TABELO 3: VERBOJ

Lingvo	Havajonho	Majo	Simple	Tink	Uni Dumi	Mine	Dalingva	Eules	Uniwersalo
Finajo		konsonanto	-aron	neregula	-a		Konsonanto, dusilaba		-i
Infinitivo			Bin-aron			Radiko + ri			
Prezenco	Sen finaĵo <i>(Ha kavali tetto)</i> (Mi iras hejmen)	Sen finaĵo	" Ne ekzistas: · Neregulaj verboj · Verbotempoj · Pasiva voĉo	Mem la verbo <i>(Hot orema cukvenko</i> · La patrino manĝas.)		Nemarkita <i>(Me giza)</i> (Mi skribas)	Nemarkita <i>Barak (iras)</i>	Nemarkita <i>Samu (néz)</i>	Nemarkita <i>Bu roboti (mi laboras)</i>
Preterito	o- prefikso <i>(Ha okavali tetto)</i>	- ek finaĵo (munok- munike ek)	· Distingo inter la konjugacioj"	kat + inf. <i>(Hot orema <u>kat</u> cukvenko)</i>	-tro (sufikso)	-l sufikso <i>(me giza<u>l</u>)</i>	Fil +inf. <i>(<u>Fil</u> barak)</i>	Radiko+`zo <i>(samu`<u>zo</u>)</i>	past + inf. <i>(Bu <u>past</u> roboti.)</i>
Futuro	- o sufikso <i>(Ha kavali<u>o</u> tetto)</i>	futri (helpverbo)		vut + inf. <i>(Hot orema <u>vut</u> cukvenko</i>	gu lesa (frazofine)	Prezenco + temp- adverbo	Len+ inf. <i>(<u>len</u> barak)</i>	Radiko +`fu <i>(samu`<u>fu</u>)</i>	Futur + inf. <i>(Bu <u>futur</u> roboti.)</i>
Imperativo			-aron (forfalas)	Sam+inf.			Radiko+pronomo		Let +inf

							(Setar rok! Sidiĝu!)		Let gu goi! (Ni iru!)
Kondicionalo	Lev (frazkomence) (Lev pupa ham tetto= Patro havirus aŭton.)		-ana ego binana (mi estus)	Raf+inf.	Adro Ĉiam post la verbo	-ga sufikso	Go + verbo (Ob go safar Mi forveturus.) Ob go fil safar Mi forveturintus.)		Inf.+us (bu mang <u>us</u>) Mi manĝus.
Kopulo	Lol	Sum	Binaron	Meti			To		

Por la formoj de faktitivo kaj refleksivoj nur unu lingvo, DALINGVA, ellaboris solvojn.

TABELO 4: NUMERALOJ

Numeraloj	Havajonho	Majo	Simple	Tink	Uni Dumi	Dalingva	Mine	Uniwersalo	Eules
0		zon			ui	nu			
1	tam	bon	on	er	ei	unu	enij		
2	tem	deg	du	do	ze	du	denij		
3	tim	tar	tre	zi	de	tru	terij		
4	tom	sul	fri	re	vu	fru	verij		
5	tum	pet	fro	gu	fu	tibu	kerij		
6	tal	ses	sax	lo	se	siku	gorij		
7	tel	sin	on	ve	si	su	zorij		
8	til	akut	fon	ho	au	eyu	norij		
9	tol	niet	mer	bi	ne	nanu	corij		
10	deke	osol	len	ne	zi	bondu	sorij		
11							roenij		
20		degol	du len		zezi	dubondu	derorij		
26		degol-ses			zezi se	dubondusiku			
100	ceno	bosol	keko		zizi	senu			
113		bosol-osol-tar							
1000	nilo		tasa		zizizi	milu			
10.000		osbonosol							
1.000.000			mille						

NOTOJ

1 "dumi" aludas al la hungara verbo "dumál", signifanta: 'paroladi longe kaj tede'

2 la vorto "les " estas la prononcita hungara vorto "lesz", signifanta "estos "

3 "**da** dog" signifas "balbutas" en la hungara lingvo

4 Tiu ideo venis sendube el pli frue kune studitaj lingvoprojekto kaj lingvistikaj artikoloj de István Gáti (1749-1834), (Litaraturo: Szerdahelyi, István (1980): *Bevezetés az interlingvisztikába*. Budapest: Tankönyvkiadó, 290 p.

5 En la hungara lingvo ne ekzistas prepozicioj

6 La listigitaj vortoj eniris la vortprovizon pro la kreitaj tradukaĵoj.

La artikolo aperis en: FIEDLER, Sabine - HAITAO, Liu (red.) *Studoj pri interlingvistiko - Studien zur Interlinguistik*. KAVA-PECH, Praha, 2001. **ISBN:** 80-85853-53-1. Rete konsultebla: http://www.esperantic.org/librejo/dbstudoj/19_katalin.htm#P165_13157